



EKE
esperanto



11 an de novembro 2014

Tiun tagon forpasis unu el niaj fondintoj kaj la unua kasisto de EKE, Sinjoro Ru Bossong.

Hodiaŭ mi ricevis la funebran leteron kaj frapis min la birdo (gruo) kaj la teksto:

Ru wist wat hij wilde. Een bevlogen man met liefde voor natuur en cultuur, maar vooral voor Catrien. Socialist en esperantist in hart en nieren.

Post fruktodona vivo glitis el la vivo

25-9-1923 11-11-2014

Ru sciis kion li volas. Entuziasma persono kun amo por naturo kaj kulturo, sed precipe por Katrin. isosta socialisto kaj esperantisto.

Precize antaŭ 50 jaroj, la 15an de decembro kunvenis kelkaj esperantistoj en Floraplein 23 Eindhoven kaj fondis la Esperanto Klubo Eindhoven. Poste mallongigita al EKE.

Kelkajn jarojn poste mi konatiĝis al EKE. Jam dum mi sekvis la televidan kurson en 1971, la estraro de EKE invitis min al sia kunveno. Tuj Ru pretis instrui. Ĉiun semajnon ni kunvenis kvar-kvinope por spertigi la parolon kaj inter ni lia nomo baldaŭ ŝanĝiĝis al “vivanta vortaro”.

Ne nur vortojn li konis, sed ankaŭ ĉiujn plant-, arbo-, birdonomojn. Promenante kun ni inter la kampoj kaj arbaroj dum la juniaj piknikoj, li montris kaj klarigis pri plantoj kaj bestoj.

Iun sunplenan aŭtunan sabatomatenon Ru entuziasme alvokis: “Cu vi vidis ilin? Ĉu vi aŭdis la sonon?” (Ru nur parolis esperante) Temas pri dudeko da grupoj, superflugantaj, belege kontraste al la helblua ĉielo.

En la klubvesperoj dum skrabloludado neniu sukcesis gajni premion, do ek de la komenco li fariĝis la gvidisto.

Kiam laŭ sia opinio Katrin tro larĝskale parolis li iel speciale scipovis limigi ŝin. Konata estas la laŭta voĉo por aŭdigi al ni lian mal-konsenton aŭ opinion. Kelkaj temoj ni ĉiam klopodis eviti. Sed ho veh, se tamen foje

Entuziasme li raportis pri esperantaj eksterlandaj vojaĝoj. Pri restado en la dezerto de Nord-Afriko, pri Ĉinio, Japanio, trajnvojaĝo tra la iama Sovjet-Unio, (mi aŭdis ion pri mallonga pantalono dum noktapromenado kaj polican malkonsenton), vizitoj al Brazilo kaj Bona Espero, Islando, Kubo, ktp.. Li montris diapozitivojn kaj vigle rakontis.

Pasintan 25an de septembro Ru fariĝis 91 jara. La kunvenon de EKE en tiu monato li ankoraŭ ĉeestis kaj aŭskultis la feriajn travivaĵojn niajn. Mem li kontribuis el propraj memoroj kaj tre ĝuis la ĉokoladan torton bakita de unu el ni.

Katrin tre mankis al li post ŝia forpaso la 3an de aprilo 2012. Pli kaj pli Ru malfortiĝis, ne perdis la intereson sed la forton memstare daŭrigi.

Kaj ĝuste tiu ĉi jaro ni iom ceremonie memoras la “or”-iĝo de EKE. Ni antaŭĝojis ke el la tri fondintoj ankoraŭ du povus ĉeesti. Tiel ne estos

Esperanto estas Ru kaj Ru estas Espanto. Forpasis tre aktiva, instiga homo, ni ne forgesu lin.

Mareje van Erp, membro de EKE.